



La libroj:



En 1989 la germana eldonejo Bleicher, Gerlingen, aperigis 116-paĝan libron kun la titolo »Momentoj el eterno – Augenblicke aus Ewigkeit«, ISBN 3-88350-506-4. Temas pri kolekto de 86 germanlingvaj poemoj de Rose Ausländer, al Esperanto tradukitaj de Franz-Georg Rössler, kun grafikaĵoj de lia edzino Rita Rössler-Buckel, kiu ankaŭ kuntradukis.



»Momentoj el eterno« povis involumigi nur malpli ol duonon el entute pli ol 200 tradukaĵoj. Por ke la aliaj 118 (kaj ankaŭ la grafikaĵoj, kiuj ne povis esti presataj en la unua volumo) ne perdiĝu, ili, samrangaj kun la unuaj, aperis 1994 sub la titolo »Lasta reveno – Letzte Wiederkehr« en la eldonejo PONTO, Dudenhofen, 80 paĝoj, ISBN 3-9803-793-2-9.

La poemojn el ambaŭ libroj ni nun, en 2016, metas je dispono al niaj geamikoj tie ĉi en la »Trezorejo« de nia interreta portalo KRISTANAJ FONTOJ. Pri kelkaj tekstaj precizigoj, pri la adapto al la nova germana ortografio kaj pri la ekstera formo de la pdf-dokumentoj respondecas Albrecht Kronenberger.

© S. Fischer Verlag, Frankfurt am Main (por la germanlingvaj partoj)

La poetino kaj la tradukinto:



Rose Ausländer 1918



Franz-Georg Rössler 2008

Franz-Georg Rössler skribas en la 1a volumo:

Enkonduko:

Komence de la jaro 1983, serĉante en la Urba Biblioteko de Mannheim poeziajn tekstojn taŭgajn por komponado, la unuan fojon mi renkontis literaturon de Rose Ausländer. La enhavo de ŝiaj poemoj altiris min pro la profunde homecaj trajtoj kaj la transcenda karaktero. Same impresis la metafora, foje aŭdaca, tamen klara lingvaĵo. Mi elektis tri poemojn kaj verkis baze de ili kantaton.

Okaze de ĝia eldonado en 1987 denove vekigis mia intereso pri la verkoj de Rose Ausländer. Nun la poemoj ne alsopiris unuarange muzikon, sed preskaŭ postulis esperantigon, konsekvenco de mia aliro al Esperanto en 1985. Senhezite mi ektradukis. La esperanta lingvo pruviĝis konvinke adaptebla por senperda redono de la germana originalo. El la rikolto de proksimume ducent tradukoj prezentiĝas en tiu ĉi volumo elektita kvanto.

La aŭtorino, same kiel la iniciatinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof, spertis vivon inter pluraj kulturoj kaj lingvoj. Ŝi apartenis al lia gento. Certe ne nur tial ŝia verko meritas atenton kaj akcepton flanke de la esperantistoj. Rose Ausländer sciis poezie pridemandi la bazajn kondiĉojn, esplori la limojn de la homa ekzistado. Pro tio la poemoj rekte koncernas kaj senpere tuŝas ĉiun homon malferman kaj senteman.

Biografio:

Rose Ausländer (Rosalie Beatrice Scherzer) naskiĝis la 11an de majo 1901 en Czernowitz, la metropolo de la tiutempe aŭstruja kronlando Bukovino.

Ŝi estis edukata en liberale juda familio kaj frekventis urban liceon. Post portempa okupacio fare de la rusaj trupoj en la Unua Mondmilito, kio kaŭzis fuĝon de la familio Scherzer unue al Budapeŝto, poste al Vieno, en 1918 Bukovino fariĝis rumana. Reveninte al Czernowitz, Rose Ausländer ekstudis literatursciencon kaj filozofion. Tiam influis ŝin precipe la aŭtoroj Karl Kraus, Stefan Heym, Georg Trakl, Baruch de Spinoza, Platon, Sigmund Freud kaj Constantin Brunner.

Pro manko de financaj rimedoj post la morto de la patro en 1920 la familio decidis, ke Rose elmigru al Usono, kie estis loĝantaj parencoj. Kun Ignaco Ausländer, al kiu ŝi estis edziniĝonta en 1923, ŝi vojaĝis en 1921 transmaren. Komence ŝi tie laboris en germanlingva gazeteldonejo, kiu publikigis ankaŭ ŝiajn poemojn. Poste ŝi deĵoris en banko en Novjorko.

Post divorco ŝi reiris al Czernowitz, laboris por lokaj gazetoj kaj flegis sian malsanan patrinon. Meze de la tridekaj jaroj tie ne plu povis aperi germanlingvaj gazetoj. Rose Ausländer sekve perdis sian laborlokon. En la sekvantaj jaroj ŝi instruis la anglan lingvon, oficis kiel sekretariino kaj fine kiel laboristino en ĥemia fabriko. Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj, en 1939 tamen estis publikigata ŝia unua poemlibro »Der Regenbogen« (la ĉielarko), kiu memkompreneble ne povis trovi multajn legantojn.

En 1941 SS-anoj invadis la urbon ekstermante la judojn. La poetino sukcesis travivi la nazian regadon en diversaj kelaj kaŝejoj kune kun sia

patrino. Nur la retiriĝo en la literaturon, la okupiĝo pri filozofio kaj la propra verkado donis fortojn por ĝisvivi la liberigon.

Kiam en 1944 rusaj trupoj estis transprenintaj la urbon, la judoj tamen ne estis liberigataj. Oni rigardis ilin germanoj kaj minacis per deportado al Siberio. En 1946 Rose Ausländer denove elmigris al Usono kaj tie profesiis precipe kiel tradukistino. Post la morto de la tre amata patrino en 1947 ŝi suferis korpan kaj psikan kolapson, kiun ŝi venkis nur post unu jaro. Sekve de tiu perdo ŝi dum pluraj jaroj ne plu estis kapabla verki germanlingve kaj skribis nur anglalingvajn poemojn.

Tamen ŝi ne sentis sin hejme en Usono. Dum vojago tra Eŭropo en 1957 ŝi renkontiĝis kun Paul Celan, kiu enkondukis ŝin en la modernan germanan literaturon. Influite de tiuj spertoj ŝi reekuzis la germanan lingvon kaj samtempe radikale ŝangis la stilon de siaj poemoj. Poste ŝi fervore verkis malgraŭ nur okaza publikigado en gazetoj.

Eksprofesiiginte ŝi vizitis en 1963 Israelon kaj definitive revenis al Eŭropo en 1964. Unu jaron poste aperis ŝia dua libro »Blinder Sommer« (blinda somero). En 1971 ŝi ekloĝis en »Nelly-Sachs-Domo« de la juda komunumo en Düsseldorf, kiun ŝi post 1978 pro malsano ne plu povis forlasi. Nun denove ŝia vivo koncentriĝis, retiriĝis al nur verka agado, al pervorta lukto kontraŭ la sentebla estingiĝo.

Post ŝia reveno al Eŭropo ĉiam pli estis kreskinta la interesiĝo pri ŝia verkaro. Ŝiaj poemoj penetris vastan publikon, ŝi ricevis distingojn kaj premiojn. Post multaj libroeldonoj en diversaj eldonejoj la renoma entrepreno S. Fischer eldonis ŝian verkaron sub la titolo »Gesammelte Werke« (kolektitaj verkoj) en sep volumoj.

Rose Ausländer mortis la 3an de januaro 1988.

Pri la poemoj:

La poemoj de Rose Ausländer apartenas al du rilate la formon tre malegalaj grupoj.

La unuan konsistigas tiuj, kiujn verkis la aŭtorino antaŭ la vojaĝo tra Eŭropo, kiu okazis en la jaro 1957. Proksimume ĝis tiam la poemoj submetiĝis sub la tradician formokanonon, plenumis rigidajn ritmoskemojn kaj rimiĝis. Ili ampleksas la du unuajn volumojn de la sepvoluma »Kolektitaj Verkoj«.

La duan grupon formas la poemoj verkitaj post la studado de novaj evolutendencoj en la germana literaturo, al kiu Paul Celan gvidis kaj instigis la verkistinon. Ĉiuj ĉi tie prezentataj poemoj devenas el la dua grupo. Ili ĝenerale ne plu havas rimojn kaj striktajn ritmojn. Ilia amplekso estas modera, ofte miniatura. La lingvaĵo fluas libere laŭ la konceptoj, la formoj dependas de la esprimintencoj.

Ankoraŭ komence de tiu ĉi periodo titoloj enkondukis en la tekstojn. Iom post iom ili malaperis kaj pri la lastaj poemoj la aŭtorino menciis: »Ili venis sen titolo«.

Kiel multaj el siaj kolegoj Rose Ausländer nur tre ŝpareme uzis interpunkciajn signojn. Punktoj, komoj, kri- kaj demandosignoj nur rarege subtenas la tekstokomprenon; ofte mankas eĉ majuskloj frazokomence. Tio kelkloke povus lezi la klarecon, sed tiuj rimedoj celas novan, poezian veron transe de la interpunkciaj kaj ortografiaj limoj.

La temaro ampleksas precipe biografiajn spertojn el la juneco, el la tempo de la persekutado kaj el la kvazaŭ ermita situacio en la maljunulejo. Centre estas la emfazo de la signifo de la vorto. Pri la

vivoranda ekzistado dum la persekutado ŝi memorante skribis: »Skribi estis vivi. Transvivi.« Tio same validas ankaŭ por ŝiaj lastaj jaroj. Ŝlosilaj vortoj tra la verkoj ĉie reaperas, montrante la fonon de la idearo: Ĉielo, patrino, Tero, vorto, vi, spiro, lingvo, espero.

Vivofine la poemoj ankoraŭfoje pli densiĝis, reduktiĝis ĝis la esenca kerno kaj atingis altan gradon de ekstera simpleco lige kun interna riĉeco: signo de alta arto.

La traduko:

La esperanta traduko estas tiom konforma al la germana originalo kiom eble. Ĝi konservas ĝenerale la intersekvon kaj la enhavon de la unuopaj versoj, la majusklojn signantajn la frazokomencojn, strikte la interpunkcion. Kaj la kutima vortordo kaj arta inversio estas redonitaj per ekvivalentaj rimedoj.

En la originalo foje mankas interliga vorto; anstataŭe sekvas – ankaŭ en la traduko – la rekta frazo. Tiurilate mi apenaŭ glatigis la esperantan version kaj ankaŭ ne interpretis malevidentajn poeziajn esprimmanierojn. Nur rilate la tempoŝtupojn mi korektis la germanan prezencon kun futura senco.

Kelkalokaj leĝeraj vortmallongigoj de la origina teksto ne trovis lokon en la traduko pro la gramatika karaktero de la esperantaj finaĵoj. Tial ke ankaŭ en la germana lingvo la transitiva uzo de netransitiva vorto estas nekutima, mi utiligis samacele tiun ĉi stilaĵon.

La elekto de la poemoj spegulas la aprezon de la tradukinto; ĝi tamen donas fidindan superrigardon pri la temaro de la aŭtorino.